

Christian Fürchtegott Gellert,  
Kristo vivas

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1.) Vivas Kristo, ankaŭ mi  
Nun ne timas plu la morton.  
Min ja revivigos Li,  
Havas mi feliĉan sorton.  
Li altigas min al si,  
Fidas mi pri tio ĉi.

2.) Vivas Kristo, regas Li  
En la mondo super ĉio;  
Vivos, regos ankaŭ mi  
En eterne kiel Dio.  
Estos mi ĉe mia Di';  
Fidas mi pri tio ĉi.

3.) Vivas Kristo, malesper'  
Estus malestim' de l' Dia  
Graco kaj de l' Fil' ofer'  
Por ni kaj por savo nia.  
Ne forpuŝas nin ja Di';  
Fidas mi pri tio ĉi.

4.) Vivas Kristo, savis Li  
Min per Sia savo-faro.  
Lia volas resti mi,  
Al malbon' en kontraŭstaro.  
Helpas malfortulon Li;  
Fidas mi pri tio ĉi.

5.) Vivas Kristo, certas mi:  
Fort' diabla eĉ nenia  
Ja disigos min de Li.  
Krist' Jesuo restos mia.  
Ĉiam restos Li ĉe mi;  
Fidas mi pri tio ĉi.

6.) Vivas Kristo, vivofin'  
Nun la morto ne plu estas.  
Kristo jen atendas min,  
Mi ĉe Li por ĉiam restas.  
Diras mi nun en ador':  
Fidas mi je Vi, Sinjor'!

...

*Traduko de la Germana poemo "Jesus lebt" de CHRISTIAN FÜRCHTEGOTT GELLERT (Kristiano Timodio Gelerto, \*1715-07.04 – †1769-12-12) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2007-05.06.*

*MR-459-1 / Arg-413-819 (2007-05-07 12:50:59)*

*La origina germana-lingvo teksto troviĝas en la retejo [www.philos-website.de](http://www.philos-website.de) kaj ankaŭ en la germana eklezia kant-libro „Evangelisches Kirchengesangbuch“, n-ro 89.*